


Saluton, karaj geamikoj, nome de ĉiuj membroj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, asocio konata kiel **IFEF.**
Mi estas Rodica TODOR, la prezidantino de IFEF.



AMO 72 - 8-a Irana Esperanta-Kongreso
(10.04.2021)




Starigita en 1909, en Barcelono, IFEF havas devizon:

<< **La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn** >>


**Temo de la forumo:**

“FORTOJ kaj MALFORTOJ de IFEF”



| | | | |
|---|---|---|---|
| Aŭstrio | Brazilo | Britio | Belgio |
| Bulgario | Ĉeĥio | Ĉinio | Danio |
| Francio | Finnlando | Germanio | Hispanio |
| Hungario | Israelo | Italio | Japanio |
| Kroatio | Kubo | Nederlando | Norvegio |
| Pollando | Rumanio | Rusio | Slovakio |
| Slovenio | Suda Koreio | Svedio | Svislando |

La Federacio kunigas landajn asociojn, individuajn membrojn kaj amikojn de fervojo de pluraj kontinentoj.



IFEF havas landajn asociojn ĉefe en Eŭropo

IFEF en la mondo

Multaj el la MALFORTOJ estas komunaj por pluraj E-asocioj, nome:

- malkreskanta membraro;
- aĝigo de nia E-publiko, signifa proporcio de la movadanaj pensiuloj;
- pliiĝo de la pasiveco kaj malfacila enmiksigo en longdaŭraj projektoj;
- malfacilo altiri junulojn al la movado kaj specife al kluboj;
- ne sufiĉaj laborfortoj.

Mallonge…timiga griza estonteco!














# Fervojo…ĉu nur trajnoj kaj lokomotivoj?








# FORTOJ

## Fervojo ne signifas
## nur trajnoj kaj reloj!






















## Lernejoj kaj hospitaloj por fervojistoj



Lokomotivo-simulilo









# Ŝatokupoj







# IFEF organizas jare **internacian kongreson** kun faka, turisma kaj kultura programoj
























Kadre de la faka programo estas prezentataj diverstemaj prelegoj, multaj el ili videblaj en la FB paĝo de la Federacio.


Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)




IFEF estas aliĝinta faka asocio de la Universala Esperanto Asocio **(UEA)** ek de 1953 kaj estas membro de la Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervojistoj (**FISAIC).**

Pere de la **Terminara Sekcio**, IFEF kunlaboras kun la Esperanto-sekcio de la fervoja terminaro de **UIC** (Union International des Chemin de Fer-**Internacia Fervoja Unio**); la lasta kompaktdisko **„RailLexic“** enhavas pli ol 16 000 fakajn terminojn en 23 lingvoj, inter kiuj Esperanto.









La plej signifaj prelegoj aperas en **Fervojfakaj Kajeroj,** kolekto aperinta ankaŭ en Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko **(STEB)**


BitArkivo.org
NI PRIZORGAS LA ESPERANTAN KULTURON


IFEF jam arkivis en BitArkivo la bultenon **"Internacia Fervojisto"** kaj la kolekton **"Fervojfakaj Kajeroj"**, kiuj estas elŝuteblaj…




**www.bitarkivo.org/tag/fervojistoj?do=showtag&tag=fervojistoj**
**www.bitarkivo.org/gazetoj/internaciafervojisto**

…kaj eldonis Historion de IFEF kun Suplementoj de la komenco ĝis nun






# Kunlaboro kun diversaj asocioj kaj institucioj…




Kune kun **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)**
IFEF proponas **staĝojn** enlandajn kaj internaciajn
por komencantoj kaj progresantoj




**TAKE** (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) speciale eldonis kajeron pri fervoja konstruado, ĉefe pri stacidomoj, okaze de la IFEF kongreso en Colmar




**SITK** - Societo de inĝenieroj kaj teknikistoj pri komunikado en Poznano
**NOT** - Pola Federacio de Asocioj de Inĝenierioj

IFEF havas kunlaborajn kontraktojn kun **universitatoj** kaj organizas **seminariojn** por studentoj de la teknikaj fakultatoj

- **Pardubice,** Universitato










Universitato Pardubice, Jan Perner Transportfakultato
Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio
invitas al faka seminario

**EŬROPAJ FERVOJOJ**

**26-a februaro 2019, 9:00 – 13:00 h, lernoĉambro DB-03**
Jan Perner Transportfakultato, Studentská 95, Pardubice

Prelegantoj:
Rodica Todor (Rumanio): Pri la Internacia Fervojista Esperanto Federacio
Guido Brandenburg (Germanio): Modelo Karlsruhe
Bodo Ehrlich (Germanio): Kiel ekestas teknikaj fervojaj standardoj en EU?
Ladislav Kovář (Ĉeĥio): Diagnostiko de moviĝantaj fervojveturiloj en ĈR
Jan Niemann (Danio): Køge Nord – nova stacio
Vito Tomillo (Italio): Bologna stacio (AV)

Seminario estas dediĉita por ĉiuj interesuloj pri fervojoj en eksterlando.
Prelegoj kaj diskuto estos tradukita el Esperanto en la ĉeĥa lingvo.

Por pliaj informoj kontaktu garantianton de seminario: jaroslav.matuska@upce.cz aŭ kovar.lad@email.cz

- **Poznano,**

  Politeknika Instituto





**Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj de ESF/UEA/ILEI/TEJO**
**Kunpensigado pri Esperanto kaj Universitatoj**









# Novaj kampoj por kunlabori:
# la klimatprotektado kaj daŭripova evoluo









United Nations
Educational, Scientific and
Cultural Organization







Novaj kampoj por kunlabori:
fakaj kontaktoj starigeblaj translimen

ISAE




Univerzita
Pardubice







Novaj kampoj por kunlabori: sanitaraj trajnoj dum pandemio

UMEA











# Fervojo en Irano


**Irano** estas nun en momento de ekspansio de sia fervoja reto. Laŭ planoj anoncitaj de la nacia fervoja kompanio, la nuna fervoja reto pligrandiĝos al 25.000 kilometroj ĝis 2025. Ĉirkaŭ 7.500 km-ojn de tiu aldona fervoja reto estas nuntempe konstruita.

La Itala Fervoja Kompanio, Ferrovie dello Stato kaj la Iranaj Fervojoj subskribis interkonsenton de 1,2 miliardojn da eŭroj por konstrui 135-kilometran rapidan fervojon inter Qom kaj Arak kaj 320-kilometran fervojan konekton inter la ĉefurbo Teherano kaj la urbo Hamadan.

**Se mi kaptis vian intereson pri nia plurflanka agado, ni invitas vin kunlabori per starigi teamojn en kiu IFEF estas preta aliĝi.**

Ni atendas de vi kontribuojn pri viaj spertoj dum vojaĝoj, informojn pri fervojo aŭ alispeca transporto en via urbo, lando aŭ regiono, kaj inspirigajn ideojn por komunaj estontaj projektoj.

**DANKON!**



Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

**www.ifef.net**
**www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372**
**ifefesperanto@gmail.com**
**ifef-forumo@framalistes.org**
**prezidanto@ifef.net**

Realigo

Rodica TODOR